Friedrich Wilhelm Weber,

# Dreizehnlinden, Kapitel 8, Die Drude

1 Stille Nacht im tiefen Walde!
Um der Birken weiße Rinde,
Um der Erlen dunkle Stämme
Floß das Mondlicht weich und linde.

2 Nur der Bach im Grunde schwatzte,
Von Gesträuch und Ried umdüstert,
Wie ein Kind im halben Schlummer
Mit sich selber spricht und flüstert.

3 Und dazwischen klang der Ente
Heisrer Ruf vom fernen Teiche,
Und zuweilen auf den Rasen
Fiel die braune Frucht der Eiche.

4 Und der Dachs, der frömmste Klausner
Von den Waldbewohnern allen,
Streifte scheu, die Lichtung meidend,
Durch der Buchen finstre Hallen.

5 Dort am Hang, zum Nord gerichtet,
Fern den Straßen und den Steigen,
Lag verloren eine Höhle
In der Wildnis ödem Schweigen,

6 Weit und endlos; nach der Sage
Einst bewohnt von klugen Schmieden,
Zwerggeschlecht, das ausgewandert,
Jetzt verrufen und gemieden.

7 Schaurig war die Kluft, von rauhen
Felsenknorren überhangen;
Um das Torgewölbe schlichen
Efeuranken, grüne Schlangen;

8 Schlangen krochen durch die Spalten,
Schwarze Schlangen, Wurzelknoten,
Wo die greise Drude hauste,
Weltvergessen wie die Toten,

...

Friedrich Wilhelm Weber,

# Dektritilio, ĉapitro 8, La druidino

*tradukita de Manfred Retzlaff*

1 Regis nokto enarbare,
kalmo kaj nenio bruis;
ĉirkaŭ l' trunkoj de la arboj
milde la lunlumo fluis.

2 Nur malsupre en la valo
babiladis rivereto,
kiel flustre, duondorme
diras ion infaneto.

3 Foje nur eksonis fore
de anaso raŭka krio;
foje oni aŭdis ion,
se de arbo falis io.

4 Vagis jen la melo, kiu
vivas en arbar' ermite,
tra l' faghaloj, ĉirkaŭiris
senarbejojn li evite.

5 Tie, ĉe deklivo norda,
meze en la sovaĝejo,
jen situis iu groto,
for de ia homloĝejo.

6 Vasta estis ĝi,senfina;
iam estis ĝi loĝata
laŭ saga' de nanoj, kiuj
iris for, nun evitata.

7 Estis tio lok' terura,
kiel pordo de l' infero;
serpentumis sur la rokoj
verdaj ĉiroj de hedero.

8 Serpentumis arbradikoj
tra la fendoj de l' ravino;
kvazaŭmorta, forgesite
loĝis jen la druidino.

...

9 Einsam mit dem treuen Hunde,
Einsam mit den alten Göttern,
Die zu ihr in Vogelstimmen
Sprachen und in Sturmeswettern.

10 An der Quelle vor der Grotte
Saß sie regungslos gekauert,
Wie ein graues Steingebilde
Über einem Grabe trauert.

11 Von der Achsel hing ein dunkles
Ottervlies zur Hüfte nieder,
Ein Gewand von weißer Wolle
Hüllte faltenreich die Glieder.

12 Träumend saß sie; in der Linken
Lag die Stirne, ernst und edel,
Tief gefurcht; die Rechte ruhte
Auf des Hundes breitem Schädel.

13 Sinnend saß sie, eine Norne,
eine von en finstern Frauen,
Die den Born des Wissens schöpfen
Und den Gang der Zeiten schauen.

14 Schweiften zu entflohnen Tagen
Rückwärts eilend die Gedanken,
Beßre Zeit, eh welsche Rosse
Aus den Sachsenbächen tranken?

15 Was die Seele ihr bewegte,
War's der Gegenwart Bedrängnis?
Lag vor ihren Seherblicken
Drohend künftiges Verhängnis?

. . .

9 Sola estis ŝi kun hundo,[14]
kun la oldaj dioj, kiuj[15]
alparolis ŝin en ŝtormoj
aŭ en birdo-voĉoj iuj.

10 Ĉe la fonto antaŭ l' grot' sen
movo estis ŝi kaŭranta,
kiel griza ŝtonfiguro
super tombo malĝojanta.

11 Suben pendis lutra felo
ĝis la kokso, de la kolo;
kovris ŝiajn membrojn falda
vesto ĝis la maleolo.

12 Sonĝe sidis kun la frunt' ŝi
en maldekstra mano sia,
dum la dekstra mano kuŝis
sur la kap' de hundo ŝia.

13 Sidis ŝi jen meditante,
unu el la inoj mornaj,
kiuj ĉerpas el la fonto
de la scio, tiuj Nornaj.[16]

14 Ĉu revagis ŝiaj pensoj
al la tagoj forfuĝintaj,
antaŭ ol la Frankoj estis
Saksajn landojn konkerintaj?

15 Ĉu ŝi afliktiĝis pro la
mizerega nuna stato,
aŭ ĉu antaŭ ŝi vidiĝis
en estont' malbona fato?

. . .

[14] aŭ:
Solis ŝi kun sia hundo,
ŝi kun siaj dioj solis,
kiuj en birdvoĉoj kun ŝi
aŭ en ŝtormveter' parolis.

[15] aŭ:
sola kun la dioj, kiuj

[16] La Nornoj (vidu PIV) estas laŭ la ĝermana mitologio diinoj, kiuj destinas la sorton de la homoj, ili korespondas al la Parcoj de la greka mitologio.

16 Doch ihr Wächter knurrt', es glommen
Grünlich seine Augensterne;
Durch des Waldes tiefe Stille
Hallten Schritte aus der Ferne;

17 Männerschritte: Elmar nahte;
Vor der Drude blieb er stehen;
Gruß und Gegengruß: „Was willst du?"
Sprach sie, ohne aufzusehen.

18„Swanahild, du weise Waldfrau,
Länger als seit drei Geschlechtern
Warst du hold dem Stamm der Falken,
Seinen Söhnen, seinen Töchtern.

19 Längst zu Wodan und zu Freia
Heimgefahren sind sie alle:
Öde steht mein Haus am Hügel,
Einsam bin ich in der Halle."

20 „Junger Falk, der Weg ist offen,
Der den Freund zum Freunde leitet;
Gras und Dorn und Ranken wuchern
Auf dem Pfad, den niemand schreitet.

21 „Junger Falk, seit manchen Monden
Flogst du nicht zu meinem Grunde;
Fürchtest du des Tages Augen,
Daß du kommst zu nächt'ger Stunde?

22 Dort am Stein, zur Sonnenwende,
Sah ich dich zum letzten Male,
Doch vernahm ich wohl von deinem
Flügelschlag im Frankensaale,

. . .

16 Grumblis ŝia hundo, glimis
de okuloj liaj brilo;[17]
ĉar de malproksime sonis
paŝoj tra l' arbar-trankvilo.

17 Jen Elmar', li ŝin salutis,
rekte antaŭ ŝi haltante.
„Kion volas vi?" ŝi diris,
ŝian kapon ne levante.

18 „Svanahild', vi saĝulino,
pli ol tri generaciojn
vi favore ja konsilis
niajn Falkajn familiojn.

19 Hejmen iris al Votano
kaj al Frejo ĉiuj; domo
mia estas forlasita,
estas mi soleca homo."

20 „Malfermita al vi estas[18]
ja la voj' al amikaro,
sed sur voj' ne surpaŝata
kreskas densa arbustaro.

21 Juna Falko, longe flugis
vi ne plu al grundo mia;
ĉu vi timas la tag-lumon,
ke vi venas je hor' tia?

22 Je solstic', ĉe l' ŝtono estis[19]
lasta renkontiĝo nia,
aŭdis mi pri la enhala
brava flugil-bato via,

. . .

[17]aŭ:
verde lia okul-brilo;
[18]aŭ:
Malfermita al vi estas
ja la vojo al-amika,
sed sur vojo ne paŝata
kreskas arbustaro pika.
[19]aŭ:
Ĉe l' ofero-ŝton' okazis

23 Und wie du dein glatt Gefieder
Arg versengtest in den Flammen.“ -
„Willst du das, was mir und jedem
Menschenpflicht gebeut, verdammen?“

24 „Ich verdamme nicht, ich lobe
Edle Tat; indes ich meine,
Was dich trieb in Rauch und Gluten,
War nicht Menschenpflicht alleine.

25 Freier Jäger ward zur Beute,
Wilder Falk, er ließ sich zähmen,
Blenden mit der Lederkappe,
Mit der Riemenkette lähmen.“

26 „Sei nicht unhold, strenge Mutter;
Schmach und Unbill zur Genüge
Widerfuhr mir bei den andern:
Sei nicht herb und laß die Rüge!“

27 „Weiland rangst du mit dem Bären
Und zerknicktest ihm die Knochen:
Hat dich jetzt beim Blumenbrechen,
Feiner Knab’, ein Wurm gestochen?

28 Hat, mit dem du lange spieltest,
Endlich dich gekratzt das Kätzchen,
Und nun siehst du, armer Junge,
Weinend auf dein wundes Tätzchen?“

29 „Mutter, scharf sind deine Worte,
Schärfer als des Schwertes Hiebe;
Doch vernimm: in meiner Seele
Hadern zornig Haß und Liebe.

30 Sprechen muß ich oder sterben!
Was ich lange stumm getragen,
Einem muß ich’s, und von allen
Dir nur, Mutter, kann ich’s klagen.

. . .

23 Ke bruligis viajn plumojn
vi en flamoj.“ - „Tion, kion
homa dev’ ordonas, ĉu vi
volas nun kondamni tion?“

24 „Ne kondamnas mi, mi laŭdas
noblan faron, pensas nure:
kio pelis vin, ne estis
tio homa devo pure.

25 La ĉasist’ fariĝis predo,
kaj la falk’ malsovaĝigi
lasis sin, per leda ĉapo
sin blindigi kaj lamigi.“

26 „Ho, patrino, vi severa!
Dolorigas min ja tiaj
vortoj viaj; jam suferis
mi sufiĉe de aliaj!“

27 „Luktis vi kun urs’ kaj rompis
vi la ostojn ja de tiu:
Ĉu dum flor-rompado pikis
vin insekt’ aŭ vermo iu?

28 Ĉu vi ploras nun, ĉar skrapis
fine vin per sia pinta
ungo la katet’, kun kiu
longe estas vi ludinta?“

29 „Akraj estas viaj vortoj;
luktas ja en mia sino
unu kontraŭ la alia
amo kaj malaminklino.[20]

30 Mi parolos aŭ mi mortos!
Kion mi en mia sino
longe portis, mi ĝin povas
plendi nur al vi, patrino.

. . .

[20] aŭ:
„Akraj estas viaj vortoj;
luktas ja en mia koro
unu kontraŭ la alia
amo kaj malamfervoro.

31 Gib mir Rat, du weise Wala,
Kluge Idis, hilf dem Kranken:
Die ich lieb', ist eine Christin
Und die Tochter eines Franken!"

32 Und die Drude, aufgerichtet
Ihres Leibes Riesenlänge,
Seufzte tief, und beide Hände
Hebend, sprach sie schmerzlichstrenge:

33 „Elmar, geh, du bist verloren!
Stünd' in Brand dir Saal und Scheuer,
Minder wäre dir verderblich
Jene Glut als dieses Feuer.

34 Geh: du gehst zum schwarzen Grafen,
Geh: du gehst zum Sachsenhasser,
Beugst dem Kreuz den stolzen Nacken,
Beugst den Kopf dem Christenwasser.

35 Hast du unsrer blonden Jungfraun
Keine wert genug gehalten,
Deines Hofes, deiner Halle,
Deines Herdes fromm zu walten?"

36 Er darauf: „Die Göttermutter
Wägt die Freuden und die Schmerzen;
Wie der Wind die Wasserwellen
Leitet sie die Menschenherzen.

38 Denkst du nicht des alten Liedes,
das wir oft gesungen haben,
Wie einst Swanahild, die schöne,
Weint' um einen Wendenknaben,

39 Weint' um einen Wendenknaben,
Der verging im Eis der Elbe?
Lieb' ich außerhalb des Stammes,
Tat nicht Swanahild dasselbe?"

...

31 Helpu min, min malsanulon,
min konsilu, saĝulino!
Estas, kiun mi nun amas[21]
kristanin', de Frank' filino!"

32 Jen la druidin' rektigis
sin, profunde ŝi suspiris,
dolorige kaj severe
jenon al Elmaro diris:

33 „Jam perdita estas vi! Se
brulus la haldomo via,
malpli estus pereiga
jena brul' ol fajro tia.

34 Iru al la Franka grafo,
ke vin tiu kristanigu,
antaŭ l' kruco vi vin klinu
kaj per akvo vin baptigu.

35 Ĉu ne opiniis digna
vi el virgulinoj niaj
iun zorgi pie por la
dom' kaj stal' kaj korto viaj?"

36 Diris li: „La dipatrino
pesas ĝojojn kaj dolorojn;
kiel vento akvo-ondojn
ŝi kondukas la hom-korojn.

37 Ĉu memoras vi je l' kant' pri
Svanahildo, la aminda,
kiu ploris - ni ĝin ofte
kantis - pri junulo Vinda. [22]

38 Dronis tiu Vinda knabo,
ŝi priploris sian amon;
amas mi nun ekstertribe,
ĉu ne faris ŝi la samon?"

...

[21] aŭ:
Estas tiu, kiun amas
mi, de l' Franka graf' filino!"

[22] Vindoj aŭ Vendoj estas alia nomoj por la Slavoj. La Germanoj (kaj verŝajne ankaŭ iliaj antaŭuloj, la ĝermanaj triboj) nomis siajn orientajn najbarojn tiel, en la germana lingvo: Wenden.

39 Traurig sank das Haupt der Alten:
„Bitter ist es, lang zu leben;
Dunkle Jahre, Reih' an Reihe
Les' ich auf den Runenstäben;

40 Älter als der Wald, ich kannte
Schon als Eicheln jene Eichen,
Graue Hünen, deren Häupter
Jetzt bis in die Wolken reichen.

41 Unverstanden wie die Sage,
Überalt und fremd im Neuen,
Gleich ich einem morschen Stumpfe
Zwischen frühlingsgrünen Maien.

42 Schlummerschwer sind meine Augen,
Wandermüde meine Füße;
Aus den Sachsengauen bring' ich
Wodan bald die letzten Grüße.

43 Götterschicksal, Menschenschicksal
Ist auf ew'gen Rat gegründet:
Einer bleibt und herrscht. - Dir aber
Hätt' ich Beßres gern verkündet.

44 Geh, ich höre meine Boten,
Die sich in den Wipfeln regen:
Auf des Waldes düstern Pfaden
Tritt das Schicksal dir entgegen!" -

45 Elmar ging. - In Wolkenschleiern
Hatte sich der Mond verborgen;
Tropfen rauschten auf die Blätter,
Grau und trübe kam der Morgen.

46 Sonder Rat, mit schwerem Mute
Schritt der Jüngling durch die Loden,
Nie so einsam und vergessen,
Nie so fremd auf eignem Boden.

. . .

39 Ŝi mallevis sian kapon:
„Jarojn vidis mir fordrivi,
mi malhelon antaŭvidas;
triste estas longe vivi.

40 Ol la altaj kverkoj tie
estas mi jam pli maljuna,
kiuj multajn jarojn kreskis
ĝis ilia alto nuna.

41 Estas mi jam prae aĝa, [23]
fremda en la novaj aĵoj,
mi egalas al kaduka
trunko inter maj-verdaĵoj.

42 Laca estas mi jam ege;
baldaŭ mi pro mortmalsano
el Saksuj' salutojn lastajn
portos al la di' Votano.

43 Dia sorto, homa sorto
estas antaŭdecidita:
Unu restas, regas. - Via
vojo estas destinita.

44 Iru! Aŭdas en la arboj
mi jam mesaĝiston mian:
Sur arbaraj padoj sombraj
vi renkontos faton vian!" -

45 Iris nun Elmar'. - La luno
kaŝis sin post nub-kurteno;
pluvo-gutoj susuradis,
grize venis la mateno.

46 Sen konsol', melankolie
tra l' arbar' li iris tiam;
tiom fremda kaj soleca [24]
li sin sentis ja neniam.

. . .

[23] aŭ:
Estas mi sagao-aĝa,

[24] aŭ:
tiom sola, forgesita
estis li ĝis nun neniam.

47 Was die Wala sprach, das dunkle
Rätselwort, wie soll er's fassen?
Meint sie Götter, die ihm zürnen? -
Meint sie Menschen, die ihn hassen? -

48 Geh nur, Elmar; holde Mächte
Sind dir nah auf allen Wegen:
Auf des Waldes grünen Pfaden
Tritt das Schicksal dir entgegen.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* FRIEDRICH WILHELM WEBER *(Frederiko Vilhelmo Vebero, ∗1813-12-25 – †1894-04.05).*

*Arg-580-1170 (2012-04-22 15:33:44)*

47 Kion diris la Valino, [25]
kiel li komprenu tion?
Ĉu ŝi celis malamikon? -
Ĉu koleran iun dion? -

48 Iru vi nur! Bonaj fortoj [26]
ankaŭ gardos vin estonte:
Sur arbaraj padoj iras
vi al via fat' renkonte.

*Traduko de la Germana poemo "Dreizehnlinden, Kapitel 8, Die Drude" de* FRIEDRICH WILHELM WEBER *(Frederiko Vilhelmo Vebero, ∗1813-12-25 – †1894-04.05) en Esperanton de* MANFRED RETZLAFF *(∗1938-11-04).*

*Arg-580-1171 (2012-04-26 09:51:11)*

[25] Laŭ la ĝermana mitologio estics Wala, esperante: Valino, la nomo de iu profetino aŭ ĝenerale profetino.
[26] aŭ:
Iru vi, Elmaro! Bonaj
fortoj gardos vin estonte: